

VENEZUELA STELO

Organo de VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO
28-a Jaro = N. 70 = 2-a Semestro 2001

ISSN 1316-0451

ESPERANTO: PRINTEMPO EN AMERIKO

Post la lastjaraj timidaj vivsignoj, kiel okazas vintre kun la naturaj kreskaĵoj, estas al ĉiuj videbla la sekura vekigo kaj la vigla eksplodo de ĉiuspecaj agadoj en la amerika Esperanto-agado. En ĉi tiu sektoro de la vasta Tero, ni certe ne povas nin kompari kun la eŭropaj movadoj, sed la abismo kiu apartigas nin de la malnova kontinento koncerne la Esperanto-movadon, ĝian disvastigon kaj ĝiajn atingojn, ne estas pli larĝa, nek pli profunda ol la abismo kiu nin disigas en la kampoj politika, socia kaj ekonomia.

La daŭraj observojkaj la registrado de la fenomenoj estas la bazo de seriozaj statistikoj, kiuj permesas kaj ebligas eltiri la prognozojn. Se ĉi lastaj estas detale kaj zorge ellaboritaj, ni troviĝas ĉe la sojlo de mirindaj atingoj, kiuj povus renversi la tendencon envii la progreson de la eŭropaj esperanto-organizoj. Mi ne intencas profeti, nek mi rolos kvazaŭ nova Nostradamus: tamen ĉio indikas, ke la sonĝo de Zamenhof havas bonan ŝancon fariĝi realo sur ĉi bordoj de la Atlantika Oceano.

Dum en Eŭropo la tereno jam estas ekspluatita kaj bezonas artifikojn por ke ĝi daŭre donu fruktojn, ĉe ni la tereno estas ankoraŭ preskaŭ netuŝita, kaj entenas ĉiujn naturajn elementojn kapablajn produkti abundajn rikoltojn.

Ni tamen ne atendas spontaneajn kreskadojn, kaj konscias pri la neceso serioze labori por atingi la celojn. Ni ankaŭ konscias pri la neceso lerni la taŭgajn labor teknikojn. En tio povas helpi niaj eŭropaj samideanoj, kiuj ekde jam pli ol unu jarcento faras senĉesajn provojn, eĉ se, kompreneble, ni devas necese adapti tiujn spertojn al niaj kontinentaj realoj. Fakte, apud kvalitoj sendube komunaj kaj al eŭropanoj kaj al amerikanoj, ekzistas malsamaj ecoj kiuj postulas alispican enfokusigon de la esperanta mesaĝo.

En Kubo, en Kolombio, en Meksikio, en Venezuelo, en Brazilo kaj same en Nordameriko, ĉiutage pli da homoj konstatas ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed ankaŭ “afero” kun interna ideo: ili komprenas ke Esperanto estas inda kaj valora vivsperto. En kelkaj landoj Esperanto furoras, en kelkaj aliaj la movado ŝajne stagnas aŭ donas timidajn paŝojn. Sed iom post iom, la printempo cedos al la somero, kaj la fruktoj maturiĝos.

Andrés Turrisi

VENEZUELA STELO
VENEZUELA

venesperanto@tutopia.com

REDAKCIA KOMISIONO: Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Nancy Aquino, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.
ELDONANTO: FUNDAESPERANTO

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

Apartado 47675, Caracas 1041 – A
venesperanto@tutopia.com

ESTRARANOJ:

PREZIDANTO: Jorge Mosonyi.
VIC-PREZIDANTO: Peter Jaimez.
ĜENERALA SEKRETARIO: Juan E. Bachrich.
KASISTINO: Esperanza Pérez.

KOMISIITOJ:

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO: Peter Jaimez.
KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO, PROTOKOLADO,
VENEZUELA STELO: Andrés Turrisi.
KONSILANTOJ: Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi,
Alfredo Portillo.

HONORAJ MEMBROJ: Juan E. Bachrich, Guillermo
A.Cook, Fernando De Diego.

ENLANDAJ DELEGITOJ: Héctor Delgado T. (Mérida),
Alfredo Ovalles (Maracay),
Germán Montero (Maracaibo),
Mayrim Sandoval (Valencio),
Jesús R. Cedeño (Maturín kaj
Ciudad Bolívar).

JUNULARAJ AFEROJ: Yuri E. Yakimec.

ALIĜINTA ASOCIO: ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.

ATENTIGO

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigataj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

NACIAJ NOVAĴOJ

Kelkaj el ĝiaj celoj, kaj certe la plej grava, jam estas atingitaj, sed FUNDACION ESPERANTO (FUNDAESPERANTO) plu ekzistos. Estos oportunaj kelkaj ŝanĝoj, sed vere necesos vigla apogo de la lokaj geesperantistoj por realigi la ceterajn celojn de la Fondaĵo, tre gravajn por la funkciado de la tuta Venezuela Esperanto-Asocio. Ni kore petas kaj rekomendas membriĝon kaj kunlaboradon: estas ebleco por ĉiuj montri sian disponon por la atingo ne de fina celo, sed de konstanta kaj entuziasma agado.

La prezidanto de Monda Turismo estos verŝajne en Venezuelo en novembro. S.ro Grzebowski jam vizitis Venezuelon antaŭ kelke da jaroj. Ĉifoje li venos kun nova grupeto de esperantistaj turistoj.

Nia juna amikino Mayrim Sandoval estas menciindaj nova akiraĵo de la movado en Venezuelo. Ŝi tute ne atendite aperis inter ni, kaj ek de la komenco montris eksterordinaran interesiĝon pri Esperanto kaj dinamismon en la agado por la disvastigo de nia afero en sia urbo, Valencio. Nun ni konas ŝiajn emojn sin projekcii trans la venezuelajn limojn. Ŝi partoprenis en la Seminario de Tejo en Hungario, poste ĉeestis la estrarkunvenon de TEJO en Kolonjo, Germanio, kaj nun troviĝas ĉe la CO de UEA.

Ni jam al kutimiĝis al la vigla poresperanta agado de nia amiko David Valecillos en Marakajbo. Atingis nin letero per kiu li informas pri nova kurso gvidata de li, kiun partoprenis sep gelernantoj, nome: Luz D. Tejeiro, Nancy Meléndez, Elida Tello, Venezuela Dellan, Maristina Izarra, Alberto Lugo kaj Marina Navarro. Pri la kurso aperis anonceto la 27-an de marto en PANORAMA, loka ĵurnalo ankaŭ prestiĝa kaj legata tutlande.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

La Esperanta Museo en Vieno havas la plej grandan kolekton de interlingvistikaj verkoj en la tuta mondo. Necesas ke la esperantistoj uzu la servojn. Se vi havas aliron al interreto, vidu la bonegan katalogon je:

<http://euler.onb.ac.at/cgi-allegro/maske.pl?db=esperanto>.

Helga Farukuoye estas ege afabla kaj helpema virino: ŝi akurate havigis al ni multe da interesa materialo. Dankon, Helga!

Estas nova kurso de esperanto en interreto jen la adreso: **www.cursodeesperanto.com.br**. Ĝi estas interaktiva, havas prononcmodelojn, kaj estas la plej bona ĝis nun farita. Venezuela Esperanto Asocio helpas per la korektaĵoj de la ekzercoj.

Heroldo jubileas. Ĝus aperis la 2000-a ekzemplero de tiu grava esperanta revuo. Ni gratulas.

Post la elekto de la novaj membroj, du pliaj virinoj eniris en la “Akademio de Esperanto”: Sabira Stahlberg kaj Anna Lowenstein. La inoj konsistigas nun 14% de la Akademianoj.

Kun la tuta unua etaĝo nun uzebla, kaj kun la nova nomo “Kulturdomo de Esperanto”, la kastelo Gresiljono iras al sia 50-jariĝo.

Ĉi jare la Universala Kongreso okazos en Zagrebo, Kroatio, kaj la venonta en Fortaleza, en nia najbara lando Brazilo. Ĉu kelkaj el ni partoprenos? Ni konas la planojn de iuj kolombiaj amikoj tiusence: estus interesa renkonti ilin kaj en internacia etoso. Ĝis la 16-a de junio aliĝis 1578 partoprenantoj.

La 57-a Internacia Junulara Kongreso, IJK, okazos inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto en Strasbourg, Francio.

INDIĜENAJ DIALOGOJ: ĈU ESPERANTO MUR INTERLIGAS ETAJN LINGVOJN KAJ POPOLOJN AŬ ANKAŬ PLIFORTIGOS ILIN?

Esteban E. Mosonyi

La iniciato nomita "Indiĝenaj Dialogoj" estas sendube unu el la plej gravaj en la nuntempa historio de nia movado. De unu jaro al alia, Esperanto situigas en la ĝustan centron de la mondskala reviviĝo de indiĝenaj kaj malplimultaj popoloj. Ĉar tiuspecaj minoritatoj allogas kreskantan nombron da simpatiantoj kaj alligiĝantoj, la kiomo de novaj esperantistoj certe multobliĝos kaj en la indiĝenaj kaj en la ĉirkaŭindiĝenaj movadoj. Tio signifus egan gajnon por Esperanto, tute neatenditan aŭtaŭ nur kelkaj jaroj. UN kaj aliaj prestiĝaj mondorganizoj forte, ja fortike subtenadas aspirojn porsocidiversecajn.

Verdire, la plejmulto de la esperantistaro ĉiam estis favora al la socia kaj kultura disvolviĝo de malgrandaj nacioj, al vastskala rekono de iliaj kolektivaj rajtoj. Grandioza ekzemplo estas, inter aliaj, la brila disvastigo de la hungara kulturo kaj literaturo inter esperantistoj pere de Esperanto. Tamen la ekesto de Indiĝenaj Dialogoj estas ia kvalite nova afero.

Laŭ Heroldo de Esperanto(30-01-2000), tiu projekto naskiĝis printempe de 1998 en Nederlando, sekve de fruktodona renkontiĝo inter José Carlos Morales, kostarika brunka indiano, kiun mi persone konas kiel gravan aktivulon de indiĝenaj rajtoj, kaj du lingvistoj-esperantistoj, Bessie Schadee kaj Silvain Lelarge. La manko de komunikado inter multaj subpremitaj etpopoloj tutmondaj iĝas drameca problemo nuntempe, kiam ili komencas akiri novajn spacojn en la internacia vivo kaj tutglobaj homaj rilatoj. Sed evidentas, ke ili bezonas unuigi siajn fortojn por estiĝi daŭre pli respektataj kaj vivkapablaj. Iliaj movadanoj kaj movadestroj ĉiam scipovas almenaŭ unu el la tiel nomataj mondlingvoj: angla, franca, hispana, portugala, rusa, ĉina, araba. Sed neniu el tiuj lingvoj estas vere universala, neŭtrala aŭ posedanta iun "internan ideon", kia certe estas Zamenhofa Esperanto.

Tiel, iom post iom, estis varbitaj kandidatoj el tre diversaj indiĝenpopoloj. Laŭ freŝbakita raporto far Katalin Smidéliusz en Internacia Pedagogia Revuo (Jan. 2001, p. 7-13), la programon nun partoprenas impona nombro da malmultpopoloj pere de tre adekvataj kaj entuziasmaj reprezentantoj: tuaregoj el Burkino, batvaŭoj el Ruando, majaoj el Meksikio kaj Gvatemalo tlingit-indianoj el Usono, maorioj el Nov-Zelando, finnugraj komioj – ankaŭ konataj kiel zirjenoj - el Rusio, kaj kelkaj pliaj.

Pro financaj kaj akademias konsideroj la projekto estas translokiĝanta al Hungario, hejmlando de Katalin, kie estos kontaktoj kun hungarlandaj minoritatoj. Ni esperu ke la romani-parolantaj ciganoj, la plej subpremata kaj neokcidenteca sed delonge enradikiĝinta malplimulto en la tuta Eŭropo,

ankaŭ ĝuados je la bonfaro de modesta iniciato, kiu disvolviĝas kaj maturiĝas kun okulfrapa rapido. Aldone al la instruo de Esperanto kiel pontlingvo, naskiĝas aliaj prioritatoj, kaj pritrakto de interkulturaj problemoj, aplikado de elektronikaj rimedoj, edukado kaj ĉiuspecaj novigoj alproksimigantaj etpopolojn reciproke kaj kun la cetera mondo. Ni menciui la nomojn de la plej laboremaj projektgvidantoj kaj kunlaborantoj krom la fondintoj: Katalin Smidéliusz, Atilio Orellana Rojas, Antonio Leoni de León, Jean Codjo, Aleksandro Melnikov, Vasili Kiselev, Jebra Muchahary, Mark Fettes, inter aliaj.

Post ĉi tiu resumo, facilas imagi ke nia lando, Venezuelo, povus iĝi nova kaj vere gravega bazo por la jam mondfama Indiĝenaj Dialogoj-projekto. Venezuelo enhavas proksimume tridek indianajn etnojn, apartenantajn al la karaiba, araŭaka, ĉibĉa, tupi-gvarania kaj aliaj grandaj kaj etaj lingvo-familioj. Ekzistas ankaŭ unu malgranda sed tre tradicia germandevena etkomunumo, Colonia Tovar, kie estas parolata arkaika altgermana dialekto: ties socilingvistika situacio estas analoga al tiu de indiĝenaj lingvoj.

Meritas substreki, ke nia nova Konstitucio akceptis la indianajn lingvojn kiel valoregan historian heredaĵon de la venezuela nacio kaj de la tuta homaro. Ĝi ankaŭ oficialigis ilian uzon regionan, kaj establis la interkulturan dulingvan edukadon por ĉiu indiĝena komunumo. Ĉio tio estas ekstreme grava, kvankam neniel signifas por ili la faktan solvon de tiom da teritoriaj, ekonomiaj, homrajtaj, socikulturaj, identecaj kaj – kompreneble – lingvaj problemoj; samkiel tiaj troviĝas ene de ĉiuj ceteraj indiĝenaj popoloj de la mondo. Rilate al la lingva situacio, necesas diri ke la hispana rapide disvastiĝas, sed multaj indiĝenaj lingvoj estas samtempe flankenlasataj, delokigataj pro multaj kialoj, kaj kelkaj estas malpermesataj aŭ eĉ jam malaperis.

Ĉio montras la bezonon tuj aligi Venezuelon al la Indiĝenaj Dialogoj-projekto, kaj ties grandegan utilon al la Venezuelana Esperanto-movado. Sed – bedaŭrinde konstante aperadas la malagrabla “sed”-vorto – mi devas antaŭe klarigi iun fundamentan aferon, signifoplenan ne nur por nia lando, sed ankaŭ por la tuta mondskala indiĝena movado.

Ekde la komenco mem de la iniciato Indiĝenaj Dialogoj, mi sisteme observas tre seriozan mankon, kiu ankoraŭ persistas. Memevidente, kune kun la instruo de Esperanto kiel interkomunikilo jam delonge estis necese utiligi, por la revigligo de indiĝenaj lingvoj, la pli-olcentjaran sperton de nia Movado je la kreado, disvolvigo kaj disvastigo de la internacia lingvo; disde sia Zamenhofa deveno ĝis la nuntempo, kiam ĝi certe stabiligis kiel plenkreska, riĉa, nuanca lingvo, tute adekvata, eĉ bonega, por senlima uzado ĉiuspeca. Antaŭnemulte Esperanto estis nenies lingvo, hodiaŭ ĝi estas parolata, legata kaj skribata de milionoj da homoj.

Indiĝenaj lingvoj estas grave minacataj flanke de lingvoj pli fortaj, altruditaj far enormaj politikaj, ekonomiaj, kulturaj imperiismaj povoj kaj potencoj. Multaj indiĝenoj hontas, post longdaŭra cerbolavado, pri siaj lingvoj, kaj ne transdonas ilin al siaj geinfanoj kaj genepoj. Eĉ dezirante transdoni la mortantan pralingvon al posteuloj, ili ja ne trovas kiel kaj kion fari. Sekve, mi urĝe postulas al la gvidantoj de Indiĝenaj Dialogoj adapti sian tutan sperton pri Esperanto al la pluvivigo de ĉiu etna lingvo.

AMUZA-INSTRUA DIALOGO

Petro revenas de sia libertempa vojaĝo, kaj en la nova lernoĵaro, li ne perdis sian malicetan kutimon kontraŭ la naivaj kamaradoj.

Antaŭ la klaso, li skribas sur la tabulon:

Estas danĝero resti kun leono

Alia kundisĉiplo, Antono, “mordas la fiŝhokon” kaj tuj eksklamas:

A – Tio ne estas korekta!

P – Bonvolu klarigi vian kritikon.

A – Laŭ la Fundamento, tio korekta estas

Estas danĝere resti kun leono

ĉar kiam la subjekto estas infinitivo, la adjektiva predikativo ricevas la adverbajn finaĵojn -e.

P – Tiun regulon ankoraŭ ne instruis al ni nia profesoro. Eĉ se la regulo de vi menciita estas valida, ĉi tiu absolute ne aplikiĝas ĉi-kaze, ĉar ne temas pri adjektiva predikativo, sed ja pri substantiva.

A – Petro, vi volas konfuzigi min, sed vi ne sukcesos. Oni devas respekti la Fundamenton, ĉar ĝi estas netuŝebla.

P – Eble, mia kara Antono, vi kredas esti leginta mian penson kaj mi tuj demonstras ke vi malpravas.

P – En ĉi tiu ekzemplo mi pensis – Petro estas anglalingvano – pri

It is a danger to remain with a lion

kaj vi bone scias ke “danger” estas substantivo. Do, temas pri substantiva predikativo, ne pri adjektiva.

Alia lernanto kiu estas hispanlingvano apogas Petron

B – Ankaŭ mi opinias analoge al Petro. ĉar mi estus pensinta

Es un peligro permanecer con un león

kaj ĉiuj scias ke “peligro” estas substantivo.

Ankoraŭ iu franclingvano manifestas

C – En mia denaska kingvo mi dirus

C'est un danger rester avec un lion

kaj “danger” estas sendube substantivo.

A – Ĉiu el vi bone scias ke oni devas pensi en Esperanto, ne en iu nacia lingvo.

P – Lasu tiun konsilon por veteranoj, ne por ni kiuj estas komencantoj. (Ironie) Pri tio vi devus elpensi novan regulon.

A – Mi ne volas plu diskuti kun vi. Bonan tagon!

Antono foriras, kaj la polemiketo finiĝas.

Skilef

HORARO DE ESPERANTA DISAŬDIGO DE ĈINA RADIO INTERNACIA

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84 / 25,16	7170 / 11925
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,75 / 19,72	11650 / 15210
20:00-20:30	Eŭropo	25,58 / 30,11 / 25,40	11730 / 9965 / 11810
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43 / 25,64	9860 / 11700

LA ESTONTO DE ESPERANTO ESTAS FINFINE SEKURA

La vero estas ke esperanto nuntempe ne malaperos. Kial? Ĉar ni havas nuntempe grandan kvanton da materialo pri kaj en ĝi. Sed kelkaj homoj diras ke eble en la jaro 2040 ĝi estos mortinta lingvo, kaj je la unua vido la argumentoj uzitaj ŝajnas trafaj. La trafeco de la kialoj restas en malnovaj pensmanieroj. Nun ni havas interreton, kaj paŝo post paŝo ĉiuj servoj de la esperanta movado lokiĝos tie. Esperanto estos alirebla por ĉiuj homoj en ĉiuj landoj.

Nun ni havas kursojn, radio-elsendojn, vortarojn, bibliotekojn, personajn kontaktojn, k.t.p. k.t.p.

En proksima tempo ni certe havos novajn esperantistojn danke nur al interreto, kaj el ili kelkaj enirus la vicojn de la tradicia movado kaj riĉigos ĝin.

Dormu trankvile, esperantistoj: la revo daŭros.

MI ŜATAS LA LINGVON

Mi ne estas normala esperantisto, mi iomete laboras en la movado sed miaj kialoj estas eble ne popularaj. Mi amas la lingvon, ĝi estas belega, riĉa, kaj ege alloga, kaj mi deziras ke multaj homoj vidu la mirindaĵon de vivanta arta lingvo.

Mi malamas neniun grupon nek lingvon, kaj ne deziras ataki iu ajn. Tial la ideo de neŭtrala movado estas grava al mi; kun reciproka respekto ni havos pacon, kaj se ni aplikos la latinan eldiraĵon “alterum non laedere” (ne damaĝu aliulon) ni havos la moralan rajton defendi nin de atakoj.

Estonte mi deziras plibonigi miajn konojn de esperanto kaj ne “ellerni ĝin” (ĉar homo neniam finos lerni), sed almenaŭ uzi ĝin kun polureco.

Mi memorigas al la esperantistaro ke ĉiam estas loko por pliboniĝoj. Almenaŭ aĉetu librojn; kaj LEGU ILIN!

A F I L I A T E A L A
ASOCIACIÓN VENEZOLANA DE ESPERANTO
PAGA TUS CUOTAS PUNTUALMENTE
APOYA NUESTRA ASOCIACIÓN
CONSIGUE NUEVOS MIEMBROS

Ne plaĉas al mi aperi kiel fundamentisto rilate la fidelon je la *Fundamento*, ĉar estas klare, ke lingvo vivanta evoluas kaj frue malfrue iuj el ĝiaj reguloj aŭ rimarkoj, jam ne tute praktikataj, estos eble forgesataj. Tamen, mi ne tiom zorgas, ke Mr. Peter Jaimez, la aŭtoro de la citita artikoleto piednote¹, estu erara aŭ ne, sed mi pli zorgas pri kiom da novatuloj li povus konfuzigi pri la afero ĉu skribi Gvatemalo aŭ Gŭatemalo. Li kredas ke ĉar la **Fundamento** konfuzigas la uzadon de la semivokalo ŭ/ŭo/ pro siaj pluraj lingvaj tekstoj, oni povas elekti inter unu aŭ alia formo. Tamen la *Fundamento* ne estas konfuziga, se oni bone legas kaj komprenas tion, kio estas la *Fundamento*.

Efektive, laŭ la unua rimarko de la rusa kaj germana tekstoj de la *Fundamento* la litero ŭ/ŭo "estas uzata nur post vokalo". Laŭ Jaimez "se mi estus lerninta Esperanton laŭ la angla- aŭ francalingva gramatiko, mi povas supozi ke mi rajtas uzi la literon u/ŭo antaŭ aŭ post iu ajn vokalo, kaj sekve, ĉu formoj tiaj kiaj "Gŭatemalo" kaj Urugŭajo" estus eblaj kaj korektaj?"

Lia argumento estas ke la angla kaj franca tekstoj diras nenion pri la uzo de ŭ/ŭo/. Tamen la korekta respondo al lia titola demando estas jena: Ne, ĉi lastaj formoj ne estas korektaj laŭ la *Fundamento*, ĉar okazas, ke la fundamenta gramatiko konsistas nur el la rusa eldono de la Unua Libro, tio estas, la vera Unua Libro, kaj tio estas tio, kion oni aprobis en la unua Monda Kongreso de Boulogne-sur-Mer, 1905 (vidu ĉe paĝoj 9-10 de la "Ĝenerala Enkonduka Notico" de la *Fundamento*). Do, malmulte gravas, ke la franca aŭ angla tekstoj havu aŭ ne havu la unuan rimarkon, se ili ne estas fundamentaj. Okazis ke la neceso fiksi tion, kio devis esti la fundamenta gramatiko, stariĝis precize pro la ekzisto de pluraj versioj samjare kaj ne tute akordaj pri minimunaj detaloj.

Fine, Pierre Janton en sia libro **Esperanto**, argumentas ke la lingvo "havas ses malkreskantajn diftongojn, nome, aj, ej, oj, uj, aŭ, eŭ. La ŭ/ŭo/ estas uzata nur en diftongoj, kie ĝi signalas la malfortan vokalon. En komenca pozicio la ŭ/ŭo/ servas nur okaze por transkribado de fremdaj vortoj, kaj tiam ĝi ludas la rolon de duonvokalo [w] (ŭagadugu = Ouagadougou)". Mi kredas ke li tute pravas. Pro ĉio ĉi nomoj aŭ vortoj kiel *Urugŭajo* aŭ *Gŭatemalo* ne estas fundamentaj laŭ la rusa eldono, senkonsidere ĉu oni ŝatus aŭ ne uzi ilin anstataŭ la regulajn nomojn *Urugvajo* kaj *Gvatemalo*.

Kompreneble ankoraŭ Mr. Peter Jaimez povas argumenti ke *Gŭaire*, *Gŭatire* kaj *Gŭaicaipuro* estas fremdaj vortoj kaj tial la diftongo "ŭa" taŭgas. Certe, sed rimarku, ke tiuj vortoj estas pritraktataj kiel "fremdaj", ne esperantaj, kaj por esperantigi ilin oni devas diri Gvaikaipuro (ne Gŭaicaipuro), kiel Ŝespiro (ne Shakespeare). Kaj tio jam estas afero de gustoj, ne de reguloj. Mi nur okupiĝis pri lia demando: "Ĉu Fundamentaj aŭ ne?". Kaj mi jam respondis.

Johano Negrete

¹ Jaimez Peter. "Ĉu fundamenta aŭ ne?". Venezuela Stelo N° 68, Paĝo 12.

VENESPERANTO: ĈU NOVA EKIDIALEKTIĜO DE LA ZAMENHOFA LINGVO?

Neniu aŭdacus nei, ke ĉe la plejmulto de la venezuelaj parolantoj, eĉ bone regantaj la lingvon, Esperanto akiras tre specialan fonologian karakteron, foje verajn sonmutaciojn. Tio neniel dezirindas en strikte internacia komunikilo, kaj mi opinias ke estus ankoraŭ eble, post iu klopodo, haltigi tiun izoleman tendencon.

Mi scias ke esperantistoj ĉiedevenaj faradas multajn prononcerarojn. Ni pripensu ekzemple la pezan kaj enuigan vortfinakcenton de francoj, kaj la nekapablon de tiom da ĉinoj kaj eĉ da anglalingvanoj mezkorekte artikuli la "ro"-fonemon. Sed ni loĝas en Venezuelo kaj sekve devas okupiĝi ĉefe pri niaj propraj problemoj.

Unualoke mi devas mencii la teruran "hohumadon", la anstataŭon de la sibla "so"- fonemo - precipe en silabfina pozicio - per la aspira "h", tiel ke enbuĝe de venezuelanoj, kaj de multaj aliaj hispanparolantoj denaskaj kaj nedenaskaj, vortoj kiaj "Esperanto", "kosto", "artisto", "komunismo", "mi estas", obstine sonadas "Ehperanto", "kohto", "artihto", "komunihmo", "mi ehtah"; kelkfoje eĉ "mi eta", pro forigo de la malforta "ho"-sono. Tiu sola fenomeno igas Venesperanton surrealistma, preskaŭ ekstertera. Mi jam aŭdis diri "mikra ke li ta malsana", anstataŭ "mi kredas ke li estas malsana". La eraro estas ĝenerale subkonscia, pro kio la venezuelaj samideanoj devus surbendigi sian spontanegan prononcmanneron en monologoj kaj dialogoj, por poste demandi la komentojn de esperantistoj alilandaj kaj alilingvaj.

Estas ankaŭ serioza afero la ekstrema malfortigo de la principe firmaj kaj fermaj okluzivaj fonemoj "b", "d", "g", voje de la tipe hispana spirantigo aŭ frikativigo. La "d" povas facile malaperi, kaj la "b" transformiĝi en iuspecan sendentan "v": "agado" pasas al "agao", "parolado" al "parolao", "temporaba" al "temporava". Inverse, "povo" foje sonetas "pobo", kun tre malforta "b". La hispana prononcado de "mi legas" estas ofte aŭdata de alilandanoj kiel "mi leas".

Gravega problemo estas ankaŭ la neŭtraligo de "j", "ĵ" kaj "ĝ" en ian novan fonemon "dj". Tiel, vortoj kiaj "jam", "kajero", "ĵaŭdo", "ĝojo", konfuziĝas kaj kunfuŝiĝas en neologismojn kiaj "djam", "kadjero", "dĵaŭdo", "djodjo".

Ekzistas sendube multaj aliaj malfacilaĵoj kaŭzitaj de la venezuela karaibhispana substrato. La "z" transformiĝas en "s", la "c" en "ks", la "ŝ" en "ĉ", inter aliaj. Do, "okazo", "peco", "kaŝi" kutime sonas "okaso", "pekso", "kaĉi". Ni registras ankaŭ la konstantan malstreĉigon kaj malaperon de silabfinaj konsonantoj kaj konsonantsekvencoj. Sed mi ne volas maldigestigi la karajn legantojn.

Necesas aldoni, ke ĉi tiuj rimarkoj estas faritaj kun tute konstrua spirito, por laŭgrade korekti jam delonge enradikiĝintajn misuzojn, daŭre preterlasatajn en konvenciaj kursoj. Tamen pli valoras erare paroladi Esperanton ol saĝe silenti. Sed kelkfoje ni bezonas pripensi la formalajn aspektojn de la lingvo, ĉiam perfektigante nian lingvouzon.

FINPLUVAS

- Finpluvus.

Ĉe tiel malfeliĉa novaĵo Raúl, kiu estis razanta sin, sin tranĉis sub la nazo.

- Maria! Nekredeble! Kiel vi diras tion tiel, tute tuje,

Maria streĉiĝis. Ŝi turnis la paĝon de la ĵurnalo kaj direktante la voĉon al la banĉambro, daŭrigis:

- Kaj tio ne estas ĉio, nek la plej malbona. Ĉi tie oni asertas ke ekstartos senpluva periodo kiu daŭros ĉirkaŭ du monatojn.

Raúl denove sin tranĉis. Jam tio estis neeltenebla. Sekigante al si la vizaĝon kaj enirante la dormoĉambron

li kriis:

- Sed, ĉu vi ĝuas dirante tiajn vortojn? Kio okazas al vi?

- Temas pri du demandoj – ŝi respondis, indiferentece – kiujn mi respondos lante, en la sama vico laŭ kiu ili estas formulitaj.

Raúl, pentoplana, sidiĝis sur la liton.

- Pardonu. Mi blindumiĝis. Vi devas kompreni ke...

- Jam finpluvus – Maria konstatis, malgaje.

Kaj ambaŭ ekploris.

Raúl prenis sian pluvmantelon. Tiun ruĝan kun arĝentkoloraj steletoj. Ĝi estis la preferata el lia kolekto, kiu lasta estis la plej grava, verŝajne, en la tria mondo. Cent dek sep pluvmanteloj, ĉiu el ili el malsama marko, ĉiu el ili kun sia propra personeco. Tiuj, kiu nur posedas unu, nigran, grizan aŭ travideblan, probable miros. Sed ili komprenos ĉio. Iom post iom.

Raúl povintus sin konsideri, pro sia kolekto, unu el la plej bonsortaj homoj sur la tero. Tamen li devis agnoski ke la cent dudek pluvombrejoj de Maria vaste superis lin. Ek de la norma pluvombreto – tiu nigra – ĝis la plej koketa (kun plenkolora fotoĵo de iu bovino mortinta pro senpluvo) ĉiuj estis vera petolaĵo.

Raúl tamen kelkfoje malakordis pri la legitimeco de du el la pluvombrejoj de Maria: unu ekzemplero de El Mundo¹ kaj iu alia de 2001². Bonŝance, ekzistis neniu diskuto pri la galoŝoj. Ili posedis po sepdek sep, ekzakte samajn, ĉiujn aĉetintajn okazde de neforgesibla krosado de la Grandaj Lagoj.

Raúl estis edziĝinta. Ne al Maria, kompreneble. Kaj estis fizikisto. Specialisto pri Meteorologio.

Forpasis ne du, sed tri monatoj, ne falante eĉ ununura guto da akvo. Iun nokton, precize marde, je la deka ekpluvetis. Raúl eksaltis el la lito.

- Mi havas urĝan kunvenon en la oficejo ene de kvin minutoj.

Lia "edzino" lumigis la lampon de la litotableto kaj prenis ekzempleron de Venezuela Grafica³.

- Ĉu vere? Mi tute estis forgesinta tion. Sendube mi estas mensokadukulino.

Raúl emprofundigis sian pluvĉapelon (dudek tri komtraŭ dudek kvin de Maria), surmetis pluvmantelon eburkoloran kun bluj strioj (tre mallarĝaj) kaj paron da galoŝoj prenitaj senzorge.

- Tiu pluvmantelo... ĉu vi ne surhavis la lastan fojon kiam pluvus? – diris, ameme, lia edzino.

- Kompreneble ne – ekkriis Raul – mi estas certa pri tio.

- Ĉu vi forestos longe?

- Tio dependas. Se la pluvo pliintensiga, verŝajne mi malfruos iom pli. Ni vidos. Ĝis!

- Ĝis!

Horojn poste, dum Raúl, videble nervioza, butonumis al si la ĉemizojn, Maria iris preni la ĵurnalon kaj atente legis, eĉ antaŭ ol fermi la pardon, la Veterkondiĉojn en la Valo de Karakas. Ŝi sopiris kaj ekpensis, pliafoje, pri kiam malfaciĝa estis estinta ŝia vivo kun Raúl. La ununura, aliflanke.

La afero estas, ke malfeliĉe, malbonsorte, denove estis finpluvinta.

Okazas, ke Raúl kaj Maria ne kapablis amindumi krom kiam pluvus.

Sed Raúl estis obstina kaj fizikisto, kaj pardonu la superfluaĵon. Li studadis senĉese sian problemon. Ĝis kiam li eltrovis iun solvon laborante kromhorojn; daŭre eksperimentant, li sukcesis, kvankam altakoste, pluvigi dum duonhoro, ĉiutage, en la dombloko de Paraíso⁴, kie loĝadis Maria.

La Monda Centro de Meteorologiaj Esploroj (MCME), urĝe kunvokite, kunvenis en la Hotelo Tamanako kaj pristudis – zorgege – la aferon. Tiuj ĉiitaj, tiuj de la Observatorio Cajagal, faris la samon. En la Pensiono de la Kolomboj. Ili ne sciis kion pensi. Tiuj de la MCME ankaŭ ne.

La edzino de Raúl, tamen, estis pli sagaca. Sen provoj, sen esploroj, ŝi rimarkis la strangan rilaton ekzistantan inter tiu malofta meteorologia fenomeno kaj la sintenado de iuj homaj estuloj. Kaj ŝi petis la divorcon.

RIMARKO: Mi estis finskribanta ĉi tiun rakonton kiam oni informis min ke konata aktoro estis deklarinta a la loka gazetaro ke li ne kapablis amindumi krom kiam la radio-stacioj dissendis en ĉeno... Iuj povus akuzi min je plagiato. Sed la vero estas, ke tiun tagon mi ne povis legi la ĵurnalon. Pluvus.

^{1, 2} Ĵurnaloj de Karakas, vaste legataj tra la tuta lando. ³ Venezuela Revuo. ⁴ Kvartalo de Karakas.

RADIO AŬSTRIA INTERNACIA- ESPERANTO REDAKCIO disaŭdigas:

Vendrede: **20.30 UTC** je frekvencoj: **5945 kHz** (49 m) kaj **6155 kHz** (49 m)

Dimanĉe: **20:30 UTC** je frekvencoj: **5945 kHz** (49 m) kaj **6155 kHz** (49 m)

La programo aŭskulteblas ankaŭ pere de satelitoj: Astra ADR (11.141 H, [Bayern 3] 8, 10) kaj Astra ORF-DVB.Bouquet (12.692 H, SR 22.000; FEC 5/6)

La programo aŭskulteblas ankaŭ ĉe komenca paĝo de la TTT-ejo, <http://roi.orf.at/esperanto> ĉe “Aŭdi laŭ vole”.

La aŭskultantoj bonvolu sendi siajn informojn al Radio Aŭstria Internacia, interrete : roi.esperanto@orf.at
telefakse: **+43/1/50101 – 16056** aŭ telefone: **+43/1/50101 - 16077**

Sendu viajn leterojn al: **Radio Oesterreich International**
ESPERANTO REDAKCIO
A-1040 Vieno - AŬSTRIO

Financan subtenon danke akceptas la konto de ORF ĉe UEA: WIEN-S

ABONILO

(Eltendu aŭ kopiu ĝin)

Nomo (persono aŭ asocio aŭ gazeto):

Adreso: -----

(1) Mi deziras aboni Venezuelan Stelon por la jaro ----- kaj sendas:

a) 5 i.r.k.; b) Filatelajn poŝtmarkojn /_____/; c) libron kun titolo -----

(2) Mi deziras ricevi (surface) Venezuelan Stelon interŝanĝe de la gazeto: ----- aperanta ----- foje jare.

Dato ----- SUBSKRIBO -----

Sendu al: **VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO, Apdo. 47675, CARACAS 1041-A = VENEZUELA**
venesperanto@tutopia.com

Responde al la letero, direktita al la ILEI-Sekcioj kaj publikigita en *Venezuela Stelo* N. 68, paĝo 5, nia kunlaboranto Inĝ. Félix García Blázquez ricevis reagon de S-ro Rob Moerbeek, Provizora Prezidanto de NGGE, kiu jene komencis sian leteron:

“Estimata S-ro García Blázquez, Jam de longe kuŝas via kritiko pri la PAGa trakto pri la predikativo. En NGGE, nederlanda sekcio de ILEI, ni ne atingis la punkton, sed ĝi ja meritas atenton.....”

La temo estas arda , interesa kaj pensiga, kaj pliaj reagoj estos bonvenaj. (N.d.r.).

DEZIRAS KORESPONDI

En Finnlando, 43-jara sola fraŭlo invalida atendas ne kompatajn elmontrojn, sed sincere amikan korespondadon, kiu helpus sentigi lin malpli sola. Li volonte amikiĝus kun viroj kaj/aŭ virinoj 40/46-jaraj, parolantaj aŭ interesiĝantaj pri Esperanta, angla aŭ hispana lingvoj, kaj korespondus pri unu aŭ pliaj temoj kaj hobiaj elekteblaj inter multegaj. Skribu amase al:

Tapani Lappalainen
Hauralantie 48
FIN – 37500 Lempäälä
FINLANDO

ENHAVO	Paĝo
Naciaj Novaĵoj.....	2-3
Internaciaj Novaĵoj.....	3
Indiĝenaj Dialogoj.....	4-5
Amuza Instrua dialogo.....	6
La estonto de Esperanto.....	7
Jes, tute fundamenta.....	8
Venesperanto:ĉu nova.....	9
Reklamoj.....	10
Finpluvas.....	11
Korespondaĵoj.....	12